

La problemo de la neologimoj

Claude Gacond, 65-a radioprelego, 1964.02.26 & 29

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio pri la problemo de la neologismoj. Vi aŭdas Claude Gacond.

Budapeŝta aŭdanto, sinjoro Pal Balkanyi, instigis nin pritrakti la temon de la neologismoj. En longa letero li esprimas sian timon vidi enradikiĝi en la ĉiutaga lingvo neologismoj, kiuj ĝis hodiaŭ nur apartenis al la poezia lingvo. Li citas *frida, febla, lanta, friska, olda, kurta*, kiuj tendencas anstataŭi mal-vortojn. Kiel multaj propagandistoj, sinjoro Balkanyi timas, ke tiu riĉiĝo de la radikaro malfaciligos la lernadon de nia lingvo por la azianoj, afrikanoj kaj personoj, kies lingvo ne estas hind-eŭropa.

La timo de sinjoro Balkanyi ŝajnas al mi ripozi sur malĝusta kompreno de la vivo de la lingvoj. Lingvo, kiu evoluas, tendencas riĉiĝi. Ĝi elpruntas al aliaj lingvoj novajn radikojn kaj forĝas mem koncizajn dirojn por esprimi ofte ripetatajn frazojn.

Nia lingvo disvastiĝas senĉese. Jaron post jaro ĝi konkeras novajn regionojn aŭ fakojn. Estas normale, ke ĉiu parolanto deziras esprimi per ĝi plej precize siajn sentojn kaj pensojn. Kiam li ne trovas vorton por traduki nacilingvaĵon, tiam li tendencas krei novan radikon. La svisoj tiel kreis la radikojn *ĉaledo* por *lignodometo*, *fonduo* por tiu fama svisa manĝo farata de fandita fromaĝo en bolanta blanka vino, kiun oni manĝas per paneroj el sama kaserolo, *alemana* signifas *svisgermana* kaj *velŝa* : *svisfranca*. Tiuj kvar neologismoj uzataj ĉe ni ne troviĝas en ĉiuj vortaroj, kvankam ili vivas jam de longe esprimante precize tion, kion ni ne povus diri aliel. En ĉiu lando okazas la sama lingva fenomeno.

Estas strange, sed la malŝatantoj de la neologismoj ne kritikis tiujn neologismojn, kiujn ni tamen povus ŝpari. Antaŭ la ekzisto de *ĉaledo* oni parolis pri *lignodomo*, kaj hodiaŭ oni ankoraŭ ofte diras *svisgermana*, *svisfranca* anstataŭ *alemana* kaj *velŝa*. Jen tri neologismoj, kiuj do ne estas absolute necesaj al nia lingvo. Tamen ni neniam vidis en Svislando mem esperantistojn ilin kritiki, kiel ili kritikis esprimojn venintajn dank'al la poezia lingvo.

Niaj poetoj sentis la bezonon forĝi kelkajn radikojn absolute necesajn al sia faka lingvo. Anstataŭ *malvarmeta*, kvar silaba vorto multe tro peza en versfarado, ili forĝis el la franca la pli taŭgan esprimon *friska*. Ĉar poezio vivas en esprimo de nuancoj, la poetoj ĉefe alportis al nia lingvo adjektivojn. Ĉar la ĉiutaga lingvo ne estas tre nuanca, tiuj adjektivoj estis longe kritikataj kiel ne necesaj. Kutime la kritikantoj apartenas al tiu publiko, kiu neniam malfermas poezi-libron, kaj kiuj aĉetis la *Esperantan Antologion* pli pro celoj propagandaj, ol por ĝin atente trastudi. Tiu publiko rajtas ne uzi dekon da adjektivoj, ili eĉ rajtas ilin ne kompreni (sed tio pruvas hodiaŭ mankon de kulturo), sed ili ne rajtas, en la nomo de la dogmo de la facileco de nia lingvo, malpermesi al la nova generacio ekuzi tiujn ĝis hodiaŭ poeziajn fakajn radikojn en la ĉiutaga vivo.

Ĉiu lingvo-amanto kontraŭe nur povas fieri pri la vivanteco de lingvo, kies esprimoj forĝitaj de poetoj iom post iom troviĝas sur ĉies lipoj.

Tiujn lastajn jarojn nia lingvo multe disvastiĝis en la junularo. En tiu medio ĝi multe riĉiĝis, ĉar ĝi estas ne nur parolata por seriozaj kaj propagandaj celoj. Ĝi estas simple parolata. En ĝi oni senĉese ŝercas, vortludas, ridas, diskutas kaj disputas, mokas, kaj amindumas. Partoprenu junularan restadon, tiam vi vidos, kiom nia artefarita lingvo povas esti natura, kiom forte la mal-vortoj vivas, kvankam kelkaj renkontas paralelajn sinonimojn. Vi eĉ rimarkos, ke por multaj ekzistantaj vortoj kreiĝas paralelaj sinonimoj per neatendita malvorto, tio por la gajo de ĉiuj. Tiurilate la skirestado en Adelboden estas rimarkinda.

La junularo malŝatas la longajn esprimojn. Ĝi do diras *aŭto* anstataŭ *aŭtomobilo*, *foti* anstataŭ *fotografadi*, *eta* anstataŭ *malgranda*, *eki* anstataŭ *komenci*, *aĵo* anstataŭ *objekto*, *iĝi* anstataŭ *fariĝi*. Estas normale por ili diri *dura* anstataŭ *malmola*, *trajno* anstataŭ *vagonaro*,

La problemo de la neologimoj
Claude Gacond, 65-a radioprelego, 1964.02.26 & 29

fridujo anstataŭ *malvarmiga ŝranko*, eĉ se la gramatikiloj ne instruas tion. Tiu junularo forĝis antaŭ kelkaj jaroj la taŭgan esprimon *krokodili*, kiu hodiaŭ disvastiĝis en la tutan mondon.

Tiu junularo kritikeme vivigas la proponitajn neologismojn. Kiam ili sentas, ke la proponitaĵoj ne estas vivkapablaj, ili serĉas novajn solvojn. Imagu skiantojn, kiuj dum la tuta tago devus paroli pri *suprenirado* kaj *malsuprenirado*. Tiuj du longaj kunmetaĵoj fine lacigas. Estas do absolute normale, ke tiuj skiantoj ekuzu la *ascendi* kaj *descendi* de niaj poetoj. Tamen post iu momento tiuj neologismoj trisilabaj kaj barbaraj al nia genio montriĝas ankaŭ pezaj. Oni tiam aŭdas diri ni *scendas* por *supreniras* kaj *descendas* por *malsupreniras*. Ŝajnas, ke nova verbo naskiĝas, la verbo *scendi*, kies signifo estus *supreniri*. Sed iom post iom tiuj junuloj malkovras, ke per la jam ekzistanta radiko *supro* ili povus pli facile esprimi la samon. Ili tiam ekdiras mi *alsupras* kaj mi *desupras*. Tiu eltrovo certe signifas la ekmorton de la barbaraj *ascendas* kaj *descendas* de niaj poetoj. Kaj tio okazis sen kondamno, sen grumblado, sed per la praktikado de la lingvo dank'al la organizo de sep skirestadoj en Adelboden.

En mia hejmo ofte restadas eksterlandanoj. Esperanto tiam fariĝas dum semajnoj nia intima lingvo. Kvarfoje jam japanoj estis niaj gastoj. Ni ne rimarkis ĉe ili timon pri la neologismoj. Kontraŭe dum malfacila veturado tra nekonata urbo sinjoro Umeda proponis uzi anstataŭ *maldekstren* la japanan vorton *hidaren* por eviti miskomprenon.

Estas ankoraŭ multo direnda rilate neologismojn. Foje ni revenos al tiu temo.

Vi aŭdis Radio-Svislandon. Claude Gacond parolis pri la problemo de la neologismoj.

Ĝis reaŭdo !

-oOo-